

## ESTIĜO DE ARTA KOLEKTIVO "LA VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY"

". . . mi revis pri organizado de aktortrupo por migre viziti la grandajn urbojn de la mondo kaj prezenti artajn vesperojn. . . mi volis organizi trupon kun la nomo "Verda ĉaro" - Nu, intervenis la milito kaj . . kaj nia revo restos por la posteuloj, eble por vi. . . ĉu vi ne volus transpreni tiun ĉi- taskon? . . . "

Tiel skribis J. Baghy en unu el siaj leteroj. Longe estis tiu ĉi impulso nur sur la papero de la letero, sed ĝi tamen ne estis forgesita. Ĝi instigis al arta laboro, ĉiam pli kaj pli respondeca kaj sistema. La deklamaj kaj teatraj vesperoj en la Prahaa klubo kaj en la someraj kolegioj en Kost kaj Doksy metis sur nin taskojn ĉiam novajn kaj pli kaj pli postulemajn - kaj tiel iom post iom estiĝis malgranda arta kolektivo, kapabla realigi la ideon de la poeto kaj aktoro J. Baghy pri la Verda ĉaro. Kaj kiam atingis nian klubon la sciigo pri la ĝojigaj rezultoj de la Belarta Konkurso en Haarlem, kie la ĉeĥoslovakaj samideanoj, anoj de la Prahaa klubo akiris kvin el la dekkvar premioj, estis proponite aranĝi en la klubo vesperon de la premiitaj konkursaĵoj. Jen tasko, kies plenumiĝo indas esti transprenita de arta kolektivo, portanta fiere sur sia ŝildo la titolon "la Verda ĉaro de J. Baghy". Eĉ se la portempaj cirkonstancoj ligas la radojn de nia ĉaro al la hejmaj ŝoseoj, tamen ni volas labori tiel, ke ni povu bone reprezenti nian arton ĉie, kie brilas la verda stelo. La honora titolo sur nia ŝildo estas por ni ankaŭ honora devo por nia venonta laboro kaj ni deziras el koro, ke tiu ĉi arta laboro alportu ĝojon al sia spirita patro Julio Baghy kaj utilon al la bona ideo de Esperanto.

La arta kolektivo "La Verda ĉaro de J. Baghy".

Ni vere elkoro ĝojas pro la fondo de la supre menciita arta kolektivo kaj esperas, ke laŭeble baldaŭ ĝiaj artprogramoj povos esti prezentataj al la internacia publiko, kiel ili meritas!

La redakcio.

El la letero de prof. Dro Ivo Lapenna:

". . . Cetere, mi ĉiam kun grandega intereso sekvas ĉion, kio okazas en la Esperanto-Movado de via lando. Mi sincere admiras vin ĉiujn kaj mi estas certa, ke Movado gvidata de homoj kun tiaj idealoj kaj inspiro, devos fine triumfi. Kiu scias, eble Montevideo alportos ankaŭ al via laboro pli favorajn kondiĉojn! En la lastaj 15 jaroj ni ĉiuj ĝisvivis tiajn neatenditajn ŝanĝiĝojn, ke mi tute ne estus surprizita, se ni ĝisvivus unu ankaŭ en Montevideo. Ĉifoje, eble, en la intereso de kulturo, pli bona interkompreniĝo, paco kaj trankvilo. .. Ne miru pro la mallongeco de tiu ĉi letero. Morgaŭ mi enŝipiĝos por la vojaĝo al Montevideo. Tio ĉi estas la lasta letero, kiun mi skribas antaŭ la forveturo. Tuj post la reveno mi reskribos ..."

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20a horo. Junularo kunvenas samloke kaj samtage je la 19a horo.

Programoj por novembro kaj decembro 1954:

- 3.11.1954 Josef Vítek : Miaj kontaktoj kun francaj esperantistoj /Ia parto/
- 10.11. Dr.Pravoslav Sádlo: Kial multaj homoj ne komprenas seriozan muzikon
- 17.11. Ota Ginz: Postmilita kresko de esperanta literaturo.
- 24.11. E.Suchardová-A.Seemann: Niaj tradukistoj kaj tradukoj.
- 1.12. Dr.Frant. Macholda: Nia samtempa scio pri karcinomo.
- 4.12. La NIKOLAA VESPERO DE JUNULARO /legu pli malsupre!//
- 8.12. Josef Vítek: Miaj kontaktoj kun francaj esperantistoj /IIa parto/
- 15.12. Libera tribuno de la membraro.
- 16.12. /ĵaŭde/en la granda salono: VESPERO DE LA PREMIITAJ KONKURSAĴOJ  
/por honorigi la memoron de nia Majstro/aranĝas la arta kolektivo  
"La Verda ĉaro de Julio Baghy".
- 22.12. Jaroslav Šustr: Kristnaskaj kutimoj en diversaj landoj.
- 29.12. Jaroslav Mařík: Kion al ni donis la ĵus pasinta jaro.
- 5.1.1954 E.Suchardová-A.Seemann: Písničkář-pasmo básníků sobotockého kraje  
V.Šolci.
- 12. 1. Dolfa Ba.rtošík: Eduko de difekte parolantaj infanoj en ĈSR.

#### VENU AL LA NIKOLAA VESPERO!

La junularo en Praha aranĝos la 4an de decembro /sabate/ Nikolaan vesperon. Ĝi okazos en la granda salono de nia klubdomo je la 19a horo. En la programo prezentos sin ankaŭ al ni jam konata ano de la opero en Praha majstro Horiban. - Sendu donacojn al viaj gekonatuloj. Okaziĝos tombolo. Post la programo danco. Eksterprahaanoj, kiuj volas mendi tranokton, anoncu vin kaj samtempe sendu antaŭpagon 10 Kčs al Vladimír Novotný, tř. Politických vězňů 10, Praha II. Venu ĉiuj!

#### DIVERSAĴOJ.

Novaj kursoj okazas de la 13a de oktobro ĉiumerkrede en la klubejo de VŽKG en Zámek, Vítkovice. Komencantoj de la 15a - 16a, progresintoj de la 16a -17a horo. De la 17a - 20a okazas kunvenoj de junularo. La kursojn gvidas V.Slaný, D.Kočvara,Z.Skvrňa,L.Adámek. Nova kurso komencis en oktobro ankaŭ en Most, kie instruas s.Caklová.

Nia membro J.Vítek prelegis la 12an de oktobro pri Laponujo al la ministoj en Mošt. La prelego estis instigita de lokaj esperantistoj.

Jan NERUDA v dánštině. Nedělní číslo předního dánského listu National-tidende ze 17. října přináší na celé straně Nerudovu povídku "Byl darebákem!" Přidaný pěkný obrázek je dílo kodaňského umělce Hagsteda. Povídku převedl do dánštiny podle esperantského textu Mogens Groth, překladatel Němcové, Fučíka a jiných autorů. --

Čínský překlad z PUJMANOVÉ. "Let", úvodní báseň z posledního díla Marie Pujmanové byla uveřejněna v čínském převodu Li-Laojana v časopise "Tientsin Žibao". Čínský básník ji přeložil podle esperantského převodu a připravuje nyní vydání celé básnické sbírky "Čínský úsměv", z níž je ona báseň vzata.

Fráňa ŠRÁMEK en Skotlando. Prokrastite ni raportas, ke la poemo "Ombroj" de nia fama poeto Šrámek aperis en maja numero 1952 de "Esperanto en Skotlando." La tradukinto estas nia membro dro Tomáš Pumpr.

BULTEITO -No 19/20.

KIE VI POVAS LEGI "HEROLDO DE ESPERANTO"? /Vidu ankaŭ Bultenon nro 15, 16, 17/ Moravio - Brno: Drah. Chlubnová, Charbulova 90 N. Černovice/Junularo/- Arnošt Balaš /Mošnova 17 - Milda Jakubcová, Potácelova 70 - Jiří Kořínek, Merhautova 159 - Josef Vondroušek, Botanická 31 - Josef Ambrož, Špačkova 3, Židenice - Břeclav: Rudolf Trojna, Bezručovo nám. 20 - Bystřice p. Host.: Theodor Čejka, Podlesí - Valja Flašarová, nám. 152 - Čtyřicet Lánů u Svitavy: L. Rýznar, nro 460 - Gottwaldov XI-Otrokovice: V. p. Svit, kroužek ROH Esperanto-Hlušovice 48 u Olomouce : B. Novotný - Hulín: Old. Doležal, Leninova 888 - Háj-Chubišov 195 u Opavy: Jar. Sichová-Lorková - Jihlava: Jaroslav. Hůda, Brněnská 16 - Karviná 2-Doly: Fr. Havlík, ul. 1. Máje 540 Kojetín; Josef Lužný, Gottwaldovo nám. 36 - Kopřivnice: Jaroslav Novosad, ul. 28. října 708 - Kroměříž: Pal-Magneton, Kroužek Esperanto ROH. - Kyjovice ve Slezsku, Ant. Luzar - Lanžhot 663: Frant. Svačina - Frenštát p. Radh., Roman Michna, Lichnov 157 - Klimkovic 303; Zdenek Raška Olomouc: Dr Mohapl, tr. Svornosti 4, Josef Všolek, Polívkova 5b Olomouc XI-Opava: Ota Erben, Leninova 37 - Jar. Kuzník, Roosewelta 17 - Ostrava: Rud. Kaminský, Havlíčkova 263a, Ostrava X - Karel Janouš, Gebauerova 17, Ostrava II - - Bohumír Vaněk, Čermákova 6, Ostrava-Zabřeh - Lad. Kyselý Provaznická 10, -Ostrava-Hrabůvka, - Fr. Lička, Březí 12, Ostrava-Zábřeh - Milan Neuwirt, Dvoutky 34, Ostrava-Hrabůvka - Adolf Staňura, Táborská 42, Ostrava- Radvanice - Rud. Skalický, Místecká 94, Ostrava-Vítkovice. - Dr. Rudolf Pawlik, Štítného 8, Ostrava 3 - Prostějov: Antonín Jandík, Palackého 13a - Přerov: Richard Jůrka, Horní nám, 20 - Příbor: Ant. Satek, Dvořákova 744 /Daŭrigo/.

PRAGANO PRI ELI URBANOVÁ. Sigismundo Pragano, naskita en Rumanujo kaj edukita ĉe la universitato de Bukureŝto, depost multaj jaroj loĝanta en Nederlando, nederlanda civitano kaj docento de Esperanto kaj de rumana lingvo ĉe unu el la du universitatoj de Amsterdamo. Docento Pragano estas unu el la plej eminentaj konantoj de la Esperanto-literaturo kaj fakte estis vervora ĝuo aŭdi lin prelegi pri la polaj klasikuloj, pri la majstroj de la budapeŝta skolo, pri pariza sprito, personigita de Raymond Schwartz kaj fakte pri kelkaj altranguloj de la lastatempa originala literaturo, i. a. la ĉeĥa verkistino Eli Urbanová, kiu estas la granda promeso por estontaj tempoj. /El ĉefartikolo pri Sveda Somera Semajno 1954 en Frostavallen en oktobra numero de "Svenska Esperanto-Tidningen". /

SE VI POVIS UZI ESPERANTON en grava afero, ne forgesu nin informi pri tio, por ke ni povu diskonigi tiun interesan-fakton kaj utiligi ĝin en diversaj lokoj!

JOSEF VONDROUŠEK 50-jara. La prezidanto de nia frata klubo en Brno, longjara komitatano de UEA kaj senlaca disvastiganto de nia movado festas meze de poresperanta laboro la I.XII. sian kvindekjariĝon. Li akceptu ankaŭ niajn tutkorajn bondezirojn kaj samideanajn salutojn. Plena sano daŭre lin akompanu!

EK en Praha

Aldone al la menciitaj kursoj /sur la antaŭa paĝo/: Kurson, kiun aranĝis EK en Brno,

vizitas 33 novaj adeptoj. Instruas Josef Vondroušek.

TUTŜTATA EKSPozICIO DE ALUMETAJ ETIKETOJ EN PRAHA /Klementinum/  
altiras nian atenton pro la esperanta kolekto, kiun majstre aranĝis nia artgrafi-  
kisto Dolfa Bartošík. Li akceptu nian dankon!

GRAVA DOKUMENTO pri uzo de Esperanto: Ĉeĥa Akadeno de Sciencoj kaj Artoj  
al ĉiuj Akademioj de la civilizita; mondo. Esperantlingva respondo el 1919 al la  
memorskribo de la magiara Akadeno en kelkaj - nenultaj - ekzempleroj nun havebla  
ĉe EK Praha. La 4-paĝan memorandumon ni sendas por 3 Kčs aŭfrankite.

ESPERANTO KAJ STENOGRAFIO. Kun ĝojo ni registras tutpaĝan recenzon en julia nro de "Fluganta Skribilo" pri la slovaka verko "Stenografia III de Jozef Mistrik kun ripetaj aludoj al Esperanto. Ĉefartikolo en oktobra nro de sama revuo portas la titolon "Kiel oftaj estas la literoj en Esperanto", temo interesa por multaj, sed precipe grava por stenografio. Aŭtoro de ambaŭ publikaĵoj estas Adolf Staňura el Ostrava-Radvanice.

DOMSIGNOJ. Se vi deziras, ke nomo de via urbo aperu en grava scienca verko, relegu artikolon sub tiu ĉi titolo en Bulteno nro. 16 kaj agu laŭ ĝia enhavo. Al Praha aldoniĝis laŭ nia scio nun Cheb, kies muzeo liveros materialon al la nederlanda samideano Alings. Kiu sekvos?

Nia F. V. LORENZ ĈIAM AKTIVA. Post bona resonado, kiun vekis eldono de la Antologio de Brazilaj Rakontoj, decidis la brazilaj samideanoj prezenti al la internacia legantaro ankaŭ elstarajn verkojn de la brazila poezio, bedaŭrinde malmulte konata al la cetera mondo. La libro portas la nonon Antologio de la Brazila Poezio kaj enhavas verkojn de 100 brazilaj poetoj en Esperanto-traduko. Estas por ni honoro kaj ĝojo legi, ke la Brazila Esperanto-Ligo komisiis per preparo de tiu verko nian samlandanon Franciskon Valdomiron Lorenz, kiu en 1890 verkis kaj eldonis la unuan ĉeĥan lernolibron de Esperanto kaj kiu depost pli ol 60 jaroj vivas en Brazilo, kie li fidele plugas la Esperanto - kampon. - -

ĈEĤA GAZETARO PRI ESPERANTO raportadis iam pli, iam malpli ofte - multo dependis de la aktiveco de niaj laborantoj. Tio kompreneble ne validas nur kiam la ĉeĥaj gazetoj en konkordo pri ni silentas. Kiam ni nun legas pri laboro de gazetaj servoj en iuj landoj /ĉiuj tiuj landoj estas pli grandaj ol nia respubliko/, ni ŝatas rememori la rezultojn de nia antaŭmilita laboro. Ekzemple en la jaro 1936 venis en niajn manojn 2150 publikaĵoj el 325 diversaj ĉeĥoslovakaj gazetoj. Ni timas, ke simila cifero ne estis en alia lando atingita. Ni estos kontentaj, se ĝi estos instigo. Kaj ne estas sen intereso aŭdi pri niaj pioniraj tempoj. Ni scias pri la revuo Lotus en Praha, kiu skribis pri Esperanto en sia oktobra numero 1900, pri nia afero ni legis en Právo lidu de 3.4., 14. 9. kaj 23. 10. 1900, en Čas nro 100 el 1900. Kiu pli diligente serĉos, trovos ankoraŭ pli malnovajn menciojn pri E. en nia gazetaro.

Ni estos tre dankaj por tia informo.

Ni posedas grandan nombron de unuopaj numeroj de plej diversaj gazetoj esperantaj el ĉiuj epokoj de la movado. Konpletaj jarkolektoj aŭ serioj estas substrekitaj. Krome estas ankaŭ multaj nekompletaj aŭ unuopaj numeroj. Eble ĵus al vi mankas iu numero, aŭ vi volus posedi tutan kolekton. Volonte ni ŝanĝos ilin por aliaj presaĵoj aŭ libroj aŭ vendos laŭ interkonsento. Jen la nomaro: Amerika Esperantisto/III-1908, XI-1912/, Aŭstria Esperanto-Revuo - Aŭstria Esperantisto - kaj - Deutsch Österreichischer Esperantist, -The American Esperanto-Journal /I-1907/- American Esperantist Bulletin, -Amsterdama Pioniro, -Antaŭen /Germ. Labor. E. L./, Antaŭen /hungara/, Antaŭen Esperantistoj /Lima, Peruo/, -Arbeiter Esperantist, -Arbotar Esperantisten, Belga Esperantisto/I-1908, III-1910, XIV-1928/, -Belga sonorilo, -Bibliografia gazeto /1923/, -Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista /1931/, Brazila Esperantisto, - Český Esperantista (I-1912, IV-1910, V-1911, VI-1912/ Ĉeĥoslovaka gazeto, - Ĉilo Esperantista 1901, —Ĉielarka standardo,

-Ĉasopis ĉeských esperantistů ĉiuj 8 jarkoltekoj 1907-1914. Daŭrigo sekvos en iu el venontaj numeroj de tiu ĉi Bulteno.

---

Proksima numero aperos komence de: januaro 1955 \*Eldonkvanto. 1000 Koresponda adreso : Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.